# *Interkonsentoj malfermas vojojn por kubaj eksportoj al ?inio*




**Imágen: Internet.**

Pekino, nov 13 (RHK) Entreprenoj de Kubo kaj ?inio faciligas la vojon por komerci kubajn produktojn en ?inio, nome, kafo, mielo kaj vegetala karbo, post suskribi intenc-leterojn pri la temo.

Aner Pérez, reprezentanto de la insula firmao Coratur S.A., klarigis ke la dokumentoj anta?vidas la eblecon eksporti tiujn produktojn al tiu merkato flanke de la entrepreno Cubaexport.

Du el tiuj dokumentoj estis subskribitaj en ?anhajo dum ?usa prezento de varoj kaj servoj kubaj. Unu estis kun China National Huayen Energy por vendi markojn de kafo kiel Serrano kaj Turquino kaj la mielon Apisun; kaj alia estis subskribita kun IDON International Trading por enkonduki verdan kaj rostitan kafon.

Tria dokumento, precizigis la funkciulo, estis subskribita kun Xiamen Carisol kaj celas aldoni vegetalan karbon de kvalitoj unua kaj dua, plus fulgo.

La funkciulo elstarigis la gravecon de tiuj dokumentoj, ?ar evidentigas la intereson de la lokaj kompanioj ampleksigi la perspektivojn de negocoj per tiuj eksporteblaj varoj.

La reprezentanto de Coratur S.A. vidas en la komerca rilato promesplenan estontecon, ?ar la laboro promocia ebligis krei kondi?ojn por iom post iom pliigi la ?eeston de varoj el Kubo.

Kubo ser?as diversigi kaj certigi novajn destinojn por siaj produktoj kaj servoj, jen la tradiciaj jen la novaj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/239632-interkonsentoj-malfermas-vojojn-por-kubaj-eksportoj-al-cinio

**Radio Habana Cuba**